Adresoj surloke

LYCÉE LA LANDE DE BREIL
rue Fernand Robert
RENNES

(vidu la mapon en la sekva paĝo
consultez la carte dans la page suivante)

Loka kontakto: Xavier Godivier
08 73 17 02 55 (loka tarifo)
xgodivier@esperanto.org

dum la kongreso – *pendant le congrès*
06 30 96 96 32 (poŝ-telefono)

Hoteloj :

Hotel Kyriad - rue André Meynier - 02 99 54 12 03

Hotel Arcantis - 10 rue de Guébriant - 02 99 67 33 33

Espéranto-France
08 717 718 33
info@esperanto-france.org
http://esperanto-france.org

Congrès 2006 de l'espéranto en France
Rennes • 5 - 9 mai

2a BULTENO

Kongreso de Esperanto en Francio
Congrès de l'Espéranto en France

Rennes

5a – 9a de majo 2006

Bonvenon al Rennes!

Ni bone ricevis vian aliĝilon kaj nun alproksimiĝas la kongreso! Daŭre restas loĝeblecoj en la liceo, do ne hezitu allogi pliajn partoprenantojn!
Vi trovos ĉi-sekve diversajn informojn por veni. Se vi bezonas kunveturadon aŭ ke oni serĉu vin en stacidomo, ne hezitu sendi mesaĝon aŭ telefoni dum la antaŭaj tagoj. Se vi mem pretas *aktive* helpi, vi estas ankaŭ bonvena!

Kiel atingi la kongresejon "Lycée la lande de Breil" ?



Por alveni piede el la stacidomo:
Eblas alveni post piedirado de 10 minutoj (1 km de la plej proksima bus-haltejo) aŭ 20 minutoj se vi ne ŝatas atendi la buson (2 km de la plej proksima metro-stacio)
- alvenu unue per la metroo direkte al "Kennedy" ĝis la stacio "Villejean" (dek minutoj post foriro el la SNCF-stacidomo)
- Veturu eventuale per la buslinio 16 direkte al "Beauregard", ĝis la bus-haltejo "O. de Gouges" (2a stacio) post foriro de la metro-stacio,
- aŭ daŭrigu rekte piede sekve de la strato "Alzaco" kiu iras laŭ la sama vojo kiel la buslinio 16, tiam sekvu la avenuon "Bois l'abbé" kaj finfine la straton "Fernand Robert" ĝis trapaso de la urba ĉirkaŭvojo, la liceo estas tuj maldekstre. Estas plurfoje indikita "**Lycée la Lande de Breil**"

Vi estos atenditaj en la stacidomo! Se vi indikis alven-horojn en via aliĝilo, vi estos atenditaj en la stacidomo por akompani vin per la metroo aŭ en veturilo laŭ la ebleco. Atentu: kiam vi eliros el la trajno, iru **supren** por retrovi nin en la atend-salono, ne perdiĝu aliloke. Ne hezitu telefoni por informi nin pri via alveno se vi ne jam faris aŭ por peti pliajn informojn.

Por alveni veturile:
Veturu laŭ la ĉirkaŭvojo de Rennes ĝis la elirejo **Villejean**,
- vi tiel eniras per Avenue **Charles Tillon**,
- tuj maldekstren en la straton "du **Doyen Denis Leroy**",
- kaj dekstren en la straton "**André Meynier**", (strato de la hotelo Kyriad)
- kaj maldekstren en la straton "Fernand Robert" por trapasi la ĉirkaŭvojon de la urbo kaj trovi la liceon tuj maldekstre.

Akcepto

Eblas alveni ekde vendredon 5a de majo posttagmeze, je la 17a!

Loĝado

Se vi loĝas en la liceo: **bonvolu alporti lit-tukojn aŭ dormo-sakon**.
Se vi loĝas en hotelo Kyriad, ĝia adreso estas " rue André Meynier", survoje al la kongresejo se vi alvenas veturile (vidu supre). Se vi loĝas en hotelo Arcantis, ĝia adreso estas "10 rue de Guébriant" pli proksime de la centro de la urbo.

Programo *(resumo)*

Vendredon
- ***posttagmeze*** Akcepto en la Liceo ekde 17a, korusa staĝo,
- ***vespere*** Luda vespero

Sabaton
- ***matene*** Komitatkunsido de Espéranto-France (9a)
- Skriba parto de la ekzamenoj (9a), vizito de Rennes, korusa staĝo
- ***posttagmeze*** Kunvenoj de GEE, FKEA, FET, JEFO (14a)
- Akcepto en la urbo-domo (17a)
- ***vespere*** Koncerto de Kore (21a) (MJC le Grand Cordel)

Dimanĉon
- ***matene*** Ĝenerala asembleo de Espéranto-France (9:30)
- ***posttagmeze*** Laborgrupoj pri regionaj kaj lokaj agadoj
- ***vespere*** Koncerto de MEVEN, fest-noz-vespero

Lundon
- ***matene*** Komitatkunsido de UFE, vizito de la ĝardeno Thabor
- ***posttagmeze*** Prelego de Roland Breton en la liceo
- ***vespere*** Bankedo en la centro de Rennes

Mardon
- ***tuttaga ekskurso*** al St Malo kaj Mont-Saint-Michel
- ***vespere*** Dua prelego de Roland Breton 20a (en la centro de Rennes)